


SUR FLUGILOJ DE FANTAZIO

KARL FRIEDRICH MAY kaj FRANTIŠEK FLOS



Fr. Flos.

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 15an de oktobro 2025

Homoj ŝatas aventurajn kaj fantaziajn rakontojn. En la 19a jarcento fariĝis favorata aŭtoro de tiu ĉi ĝenro franca verkisto Jules Verne. En mia lando plej multe imitis verkaĵojn de Jules Verne ĉeĥa verkisto Jan Matzal Troska. Li estis teĥnikisto, pro tio en liaj romanoj (ekz. trilogioj Kapitano Nemo kaj Batalo kontraŭ Ĉielo) abundas priskiboj de diversaj teĥnikaĵoj.

František Flos kaj Karl Friedrich May estis famaj aŭtoroj, kiuj verkis rakontojn kaj romanojn pri aventuroj, kiujn iliaj herooj travivis en malproksimaj landoj. Antaŭ verkado ili diligente studis informojn pri diversaj landoj, en kiujn ili neniam vojaĝis, sed danke al eksterordinara talento kaj senlima fantazio kapablis krei eĉ iluziojn de propraj travivaĵoj. Ili ne imitis romanojn de Jules Verne, sed enviciĝis en tutmondan aventuran literaturon.

František Flos (1864 – 1961)

Ĉeĥa pedagogo, verkisto, dramisto kaj tradukisto.

Li naskiĝis la 27an de julio aŭ aŭgusto 1864 en Přelouč. Lia patro estis buĉisto. František havis tri fratojn (Alois, 1854, Karel, 1859, kaj Jindřich, 1869). Lia edzino nomiĝis Gabriela, filoj Jiří kaj Karel.

František Flos studis en instruista instituto en Hradec Králové, poste instruis en regiono Kolín. En Týnec nad Labem li fariĝis direktoro de baza lernejo. Ekde la jaro 1923 li estis distrikta lerneja inspektoro en Pardubice.

Pri literaturo li ekkupiĝis ĉirkaŭ la jaro 1900. Ekde la jaro 1905 li redaktis popolajn kalendarojn Havlíček kaj Palacký, en la jaro 1920 li fondis infanan gazeton *Úsvit* (Mateniĝo).

Same kiel Eduard Štorch, Antonín Zhoř k. a. li verkis aventuran literaturon por junularo.

Li estis membro de Unuiĝo de ĉeĥaj verkistoj beletristoj Máj.

Li uzadis multe da pseŭdonimoj, kiuj estis ĉeĥaj nomoj de birdoj: Brabec, Vrabec (Pasero), Konopka (Kanabino), Kos (Merlo), Pěnkava (Fringo), Rorejs (Apodo), Strnad (Emberizo).

Flos interesiĝis pri problemoj de kamparanoj (rakontoj pri Šibraváček, bonkoruloj).

Liaj rakontoj estis nur humuraj, neniam satiraj. Favorata temo estas decido inter pasiva akcepto de sorto aŭ batalo kontraŭ kaŭzo de problemoj.

Kiam František Flos estis instruisto en Červené Pečky apud Kolín, li vizitadis baronon Löwenherz-Hrubý, kiu tre ŝatis orĥideojn. Flos konatiĝis kun lia kastela ĝardenisto Jan Satrapa, kiu dum sia junaĝo partoprenis en tri ekspedicioj de kolektantoj de orĥideoj en Centra kaj Suda

Amerikoj kaj Borneo. Laŭ liaj rakontoj Flos verkis sian trivoluman romanon Kolektantoj de Orhideoj (*Lovci orchidejí*).

Flos ne ŝatis filiteraturaĵojn. Li, sperta instruisto, sciis, ke infanoj kaj junularo ŝatas aventurajn rakontojn. Pro tio li metis instruojn en siajn aventurajn rakontojn.

Li amikiĝis kun vojaĝanto Enrique Stanko Vráz, vizitadis etnografian muzeon de Vojtěch Náprstek, verŝajne trarigardis zooĝardenon de Carl Hagenbeck, kiu montris en siaj kaĝoj ne nur bestojn, sed ankaŭ homojn el Afriko, Azio kaj Ameriko.

František Flos vivis longtempe (96 jarojn). Li forpasis la 8an de januaro 1961 en Prago.

El bibliografio de František Flos:

Galerie dobráků (Galerio de Bonkoruloj, 1905).

Plavčík Frantík (Junmaristo Franjo, 1913)

Nádvorník Šibraváček (Šibraváček, la Korta Manlaboristo, 1915)

Lovci orchidejí I – III (Kolektantoj de Orhideoj, 1920 – 1922):

I: *Lovci orchidejí* (Kolektantoj de Orhideoj, 1920)

II: *V pralesích Ecuadoru* (En Ekvadoraj Praarbaroj, 1921)

III: *Pod sluncem rovníkovým* (Sub Ekvatora Suno, 1922)

Strýcův odkaz (Postlasaĵo de Onklo, 1926)

Supové Atlasu (Grifoj de Atlaso, 1929)

Vzducholodí do srdce Brazílie (Aeroŝipe en Koron de Brazilo, 1929)

Z pralesů Konga (El Kongaj Praarbaroj 1932)

Babiččin Šmodrcha (Balbutulo de Avino, 1932)

V bažinách argentinských (En Argentiniaj Marĉoj, 1933)

Lovci kožišin (Ĉasistoj de Peltaj Bestoj, 1934)

Na Modrém Nilu (Sur Blua Nilo, 1935)

Albatros (Albatroso, 1935)

Taje afrických pralesů (1941, Sekretoj de Afrikaj Praarbaroj)

Za pokladem (Serĉado de Trezoro, 1946, origine *Po stopách lupičů*, Postsekvo de Rabistoj, 1930).

Karl Friedrich May

Li naskiĝis la 25an de februaro 1848 en saksonia subercmontara urbeto Ernstthal (ekde la jaro 1898 ĝi estas parto de la urbo Chemnitz) en tre malriĉa familio. Lia patro estis teksisto. Lia patrino, kiu fariĝis akuŝistino, dum sia vivo naskis 14 infanojn, sed nur Karl kaj liaj kvar fratinoj plenkreskiĝis.

Kaŭze de nutromanko Karl suferis de rahito kaj, verŝajne de kontaminita akvo, blindiĝis. Tiam lin tre influis lia avino, kiu al li rakontis fabelojn kaj historietojn. Liaj malriĉaj gepatroj preskaŭ mirakle sukcesis kolekti monon por operacio. Ankoraŭ Karl ne estis kvinjara, kiam kuracisto Gensen en Dreseno lin sukcese operaciis. Karl ekvidis.

Li eklernis en baza lernejo inter pli aĝaj samklasanoj. En libera tempo li en loka gastejo starigis kegloj en kegloludejo, por gajni monon. Lia patro sian unusolan filon devigis studi eĉ en lia libera tempo kaj pro tio alportis al li diversajn librojn. Sed la patro mem estis needukita, pro tio li tute ne sciis, kion Karl vere bezonas studi kaj kion ne. Karl lernis latinan, anglan, francan, ludi pianon, violonon kaj orgenon. Rezulto de tiu ĉi ekstrema psiĥika ŝarĝo estis psiĥikaj problemoj. Karl ne havis amikojn kaj vivis en sia propra mondo de fantazio. Krom tio li ofte legis filiteraturaĵojn.

En la jaro 1856 Karl finis lernadon en baza lernejo kun bonegaj rezultoj. Li ekstudis en Proinstruista Seminario en Waldenburg. Antaŭ Kristnasko (1859) iu Karlon denunciis, ke li ŝtelis kandelojn. Hejme la kandeloj mankis, ĉar ili estis multekostaj, pro tio Karl volis helpi al siaj gepatroj kaj fratinoj. Laŭ la unua versio Karl ŝtelis ses kandelojn, laŭ la dua versio tri kandelojn, laŭ la tria versio li ŝtelis neniujn kandelojn, nur kolektis restaĵojn de kandeloj el kandelinoj, por fari el ili kandelojn por siaj familianoj. En januaro 1860 oni kaŭze de tio lin eksigis el la seminario.

Bonŝance aliaj potencaj elstaruloj opiniis, ke tiu puno estis tre violenta, kaj permesis al May finii lian studadon en alia instituto en Plauen.

Li fariĝis helpanta instruisto en Glauchau, sed pro afero kun edziniĝita virino, kiun li (ankoraŭ puberulo) aŭdacis kisi dum instruado de piana ludo, li baldaŭ devis foriri.

En Alchemnitz li instruis laboristojn. Lia kunloĝanto lin ne ŝatis, ĉar same kiel antaŭ alveno de May li volis havi komunan loĝejon nur por si mem. Li havis du horloĝojn, unu el ili pruntedonadis al malriĉulo May, kiu havis neniun horloĝon. Antaŭ festo May denove prunteprenis la horloĝon, cigaredingon kaj pipon. Lia kunloĝanto volonte al li ĉion pruntedonis, sed poste lin insideme akuzis pri ŝtelado de la horloĝo. Kiam May en Ernstthal ludis bilardon en gastejo, ĝendarmoj lin arestis. May ses semajnojn (8 septembro – 20 oktobro 1862) suferis en malliberejo en Chemnitz, kaj oni malpermesis al li plu instrui. Kaŭze de tio May psiĥike kolapsis. Nehavante laboron li ŝtelis, trompis homojn.

En la jaro 1865 oni lin en Leipzig arestis kaj por kvar jaroj kaj unu monato malliberigis en Osterstein apud Zwickau. En la malliberejo (14 junio 1865 – 2 novembro 1868) li fariĝis malliberulo numero 171. Li bone kondutis, laboris en skribejo, fabrikis cigarujojn kaj volonte zorgis pri mallibereja biblioteko, pro tio oni lin jama en la jaro 1868 liberigis. Hejme li eksciis, ke lia amata avino forpasis. Li denove psiĥike kolapsis. Ekde tiu tempo li eksuferis de disociativa difekto de personeco. Tio signifas, ke li ŝtelis, kontrabandis alkoholaĵojn, trompis, sed poste tute ne pensis pri tio, kion faris, li tute forviŝis sian malbonan agon el sia cerbo. May kondutis malbone.

Kaŭze de tio la 2an de junio 1869 oni lin arestis. Sed May jam estis sperta krimulo. La 26an de junio 1869 dum transporto May batis gardestron per sia pugno sur lian tempion (*tiun ĉi metodon de svenigado poste multfoje uzadis lia literatura heroo Olda Shatterhand*) kaj fuĝis en Bohemion. En januaro 1870 oni lin arestis en nordbohemia vilaĝo Valkeřice (Regiono Děčín). La 13an de aprilo 1870 oni lin kondamnis por kvar jaroj de malliberejo en Waldheim kaj du jaroj de polica inspekto. Tie li estis ĝis majo 1874. En malliberejo li suferis de neŭrastenio, hipnotaj psiĥozoj, parolis kun fiktivaj herooj. Li laboris kiel orgenisto. En la malliberejo li ekverkis kaj siajn erotikajn kaj kriminalistajn rakontojn sendis en diversajn gazetojn.

Bonŝance edukisto Heinrich Gotthold Münchmeyer eksciis lian talenton kaj ofertis al li laborpostenon de redaktoro de la semajngazeto *Der Beobachter* (Observanto).

En la jaro 1875 May translokiĝis en Dresdenon, kie verkis rakontojn kaj humuraĵojn. En rakonto Old Firehand unuafoje aperis nomo Winnetou.

Ekde la jaro 1871 ekzistis unuigita ŝtato Germanio. Homoj interesiĝis pri malproksimaj landoj, ja en la jaroj 1871 – 1896 ekziliĝis 2,5 milionoj da germanoj. Ili foriris precipe en Usonon. Tri kvaronoj da loĝantoj jam sciis legi kaj skribi. Semajna labordaŭro plimallongiĝis – de 78 horoj en la jaro 1870 ĝis 64 horoj en la jaro 1890. Pro tio la loĝantoj havis pli multe da tempo por legado. Kion ili legis? Ĉu multekostajn librojn? Ne la librojn. Malmultekostaj kajeroj kun aventuraj rakontoj de May fariĝis la plej disvastiĝita legaĵo de popolo!

En la jaro 1876 May finis kunlaboron kun Münchmeyer, ĉar tiu ĉi entreprenanto volis lin edzigi kun fratino de sia edzino. May fariĝis sendependa kaj verkis subercomontarajn rakontojn.

Ekde la jaro 1877 li estis redaktoro de semajngazeto, kiun eldonis Bruno Radelli. En la semajngazeto li publikigis sian romanon Kaptitaj sur Marnivelo (*Auf der See gefangen*), kies parton li poste enmetis en sian romanon Old Surehand.

En la jaro 1880 May edziĝis kun Emma Lina Pollmer, sed ilia edzeco, kiu daŭris 23 jarojn, ne estis feliĉa. Lia edzino tute ne interesiĝis pri lia laboro, nur pri mono, kaj ŝatis luksan vivon. Ili ne havis infanojn, ekde la jaro 1894 ilia geedziĝo disfalis kaj en la jaro 1903 May divorcis.

En la jaroj 1881 – 1884 oni publikigis francajn tradukojn de rakontoj de May en la gazeto *Le Mond* (La Mondo), kaj en la jaro 1884 oni ilin eldonis libre.

En la jaro 1885 forpasis patrino kaj en la jaro 1889 patro de May.

Ekde la jaro 1886 May kunlaboris kun eldonisto Joseph Kürschner kaj publikigis en la gazeto *Vom Fels zum Meer* (De Rokoj al Maro). En la jaroj 1887 – 1897 en la gazeto *Der gute Kamerad* (Bona Amiko) May publikigis siajn ĉefajn romanojn:

Der Sohn des Bärenjägers (1887, Filo de Ĉasanto de Ursoj)

Der Geist des Llano Estacado (1888, Fantomo de Llano Estacado)
Der schwarze Mustang (1889 – 1897, Nigra Mustango)
Der blaurote Methusalem (1888 – 1889, Blua-ruĝa Metuzalemo)
Die Sklavenkarawane (1889 – 1890, Karavano de Sklavoj)
Der Schatz im Silbersee (1890 – 1891, Trezoro ĉe Arĝenta Lago)
Das Vermächtnis des Inka (1891 – 1892, Testamento de Inkao)
Der Ölprinz (1893 – 1894, Petrola Reĝido)
Winnetou I – IV (1893 - 1897).

Romanojn de May, kiujn oni eldonis en nia lando, plej bele ilustris moravia pentristo Zdeněk Burian. Li neniam veturis en Amerikon, sed diligente studis. Fama ĉefa vojaĝanto Alberto Vojtěch Frič proponis al Burian komunan ekspedicion en Sudan Amerikon, kiun ili kune farus post la dua mondmilito. Bedaŭrinde en la jaro 1944 Frič forpasis kaj la ekspedicio ne okazis.

Friedrich Ernst Fehsenfeld fariĝis ĉefa eldonisto de verkaĵoj de Karl May en la eldonserio *Carl May's gesammelte Reiseromane* (Kolektitaj Romanoj pri Vojaĝoj de Karl May), poste *Karl May's gesammelte Reiseerzählungen* (Kolektitaj Rakontoj pri Vojaĝoj de Karl May)

Ekde la jaro 1892 oni eldonis liajn rakontojn el Proksima Oriento.

Rakontoj de May havas simplan ŝemon: **krimo – persekutado – punado de kaŭzantoj**. Kiel en fabeloj **bono ĉiam venkas. Same kiel en fabeloj de avino**. May setligis sian Usonon per siaj personoj, nur malofte aperas homoj, kiuj en Usono vere loĝis, ekzemple fabrikanto de pafiloj Benjamin Tyller Henry. Herooj de May neniam renkontis famajn usonanojn, kiuj estis ekzemple Wild Bill, Calamity Jane, Sitting Bull. Certe May rigardis ĉirkon Wild West Show de Buffalo Bill. El milionoj da afrikaj usonanoj en romanoj de May estas prezentata nur unu: Massa Bob.

Viro, kiu dum sia infanaĝo preskaŭ ne havis manĝaĵon, fariĝis famulo. Oni lin invitas en renkontiĝoj kaj agadoj de riĉuloj. Kaj May por reklamo kapablas fari ĉion ajn. Ekde la jaro 1893 li ekuzas doktoran titolon: doktoro de filozofio Karl May, sed oni ne scias, kie li studis. Li prezentas sin kiel heroo de siaj romanoj. Li estis Kara ben Nems el romanoj pri Proksima Oriento kaj lia varianta de Old Shatterhand el romanoj pri Usono! Sed lia geedziĝo disfaliĝas kaj lia psihika sanstato estas tre malbona. En la jaro 1896 en dresdena antaŭurbo Radebeul li konstruigas novan domon: Vilaon Shatterhand. En la vilao anbundas kvazaŭsuveniroj. Inter ili ne devas manki tri pafiloj, kiujn oni scias el romanoj pri Old Shatterhand kaj Winnetou. Sed la pafilojn laŭ priskriboj de May fabrikis dresdena metiisto Oskar Max Fuchs.

En la jaro 1875 May en sia rakonto pri Old Firehand unuafoje menciis la pafilon por multe da ŝarĝoj. Aŭtoro de pafilo kun magazeno por 15 ŝarĝoj, kiu estis metiita paralele de pafiltubo, Benjamin Tyler Henry, loĝis en New Haven. Li estis talentita kaj laborema metiisto, sed bankruptis kaj lian firmaon prenis firmao de Oliver Fisher Winchester. Laboristoj de la firmao *Winchester Repeating Arms Company* la pafilon plibonigis, ĝia magazeno poste enhavis eĉ 18 ŝarĝojn, kaj ekfabrikis ĝin. La modelo 1873 estis favorata armilo de kovbojoj kaj indianoj.

Kontraŭursa pafilo origine estis produkto de angla firmao Burton from grafejo Kent el la jaro 1855. Oni ĝin servis por pafado de elefantoj. Ĝi estis tre peza (10 – 17 kg) kaj oni povas dubi, ĉu Hatatitla, la ĉevalo de Old Shatterhand, povus tiun preskaŭ pafilegon porti.

Pafilo de Winnetou, kiun May unuafoje menciis en sia romano Filo de Ĉasanto de Ursoj, estis franca aŭ germana pafilo el la jaro 1834, kiun Fuchs ornamis per arĝentaj najloj. La pafilo pezis 6 kg.

May trovis nigran ĉevalan voston kaj asertis, ke ĉevalkrinoj estas hararo de Winnetou. Li scias, ke lia amiko Winnetou naskiĝis en la jaro 1840 kaj estis pafmortigita la 2an de septembro 1874. May scias 40 – poste eĉ 1 200 diversajn lingvojn kaj dilektojn (!), li estas doktoro de filozofio, longtempe loĝis en Ĉinio kaj minimume 20-foje estis en Usono. Mensogoj, mensogoj, mensogoj!

Se iu vizitanto lin demandis, kial pafilo de Winnetou troviĝas en dresdena Vilao Shatterhand anstataŭ en tombo de Winnetou en Usono, May tion rapide eksplikis – jes, Winnetou estis entombigita kun sia pafilo, sed iuj indianoj volis la tombon elrabi, bonŝance mi tion eksciis, kontraŭ la indianoj batalis, forpelis ilin, kaj poste la pafilon de mia amiko translokgis en mian vilaon.

En la jaro 1898 May vizitis Pragon, ĉar procesis kontraŭ eldonisto Josef Richard Vilimek pri tradukoj de siaj verkaĵoj.

En marto 1899 May ekvojaĝis. Jam li estis maljuna, pro tio lia vojaĝo estis precize planita. Li loĝis nur en bonaj hoteloj, kies posedantoj estis germanoj. Li vizitis multe da landoj, Proksiman Orienton, Hindion eĉ Indonezion. Oriento lin deziluziis, ĉar li eksciis, ke ĝi aspektas alie ol en liaj verkaĵoj. Inter amikoj, kiuj lin akompanis, estis geedzoj Plöhn. Kiam fabrikanto Richard Plöhn forpasis, lia edzino Klara fariĝis sekretariino kaj ekde la jaro 1903 edzino de May.

En la sama jaro (1899) fariĝis Johannes Adalbert Fischer nova posedanto de eldonejo de Münchmeyer. May kontraŭ Fischer procesis 12 jarojn.

En la jaro 1908 May pretigis sian testamenton. La 5an de septembro 1908 li kun Klara May vojaĝis en Usonon. Ili vizitis Novjorkon, Albany, Buffalo, Niagarajn Akvofalojn, rezervejon de irokeza tribo Tuscarora, Toronton, Montrealon, Lawrencon kaj Bostonon. Post reveno May finis sian rakonton pri Winnetou (la 4an volumon).

En la jaro 1910 li suferis de pneumonio kaj verŝajne ankaŭ de ĥronika venenigo per plumbo el akvokondukilo en sia vilao.

La 22an de marto 1912 li en Vieno prelegis (*Ŝanĝoj de Eŭropo kaj Mondo pro Regno de Noblaj Homoj*). En Vieno li renkontiĝis kun Bertha von Suttner, kiu poste lin tre aprezis kaj laŭdis.

La 30an de marto 1912 Karl Friedrich May forpasis. La 3an de aprilo 1912 oni lin entombigis en Radebeul.

Fuŝado kaj falsado de verkaĵoj de May

Diversaj eldonistoj prilaboris tekstojn, ion el ili forĵetis, ion en ilin aldonis. Pro tio ekzemple en romano pri Winnetou mankas rakonto pri batalo de Old Shatterhand kaj lia amiko Old Death kontraŭ Ku-Klux-Klan-anoj.

Proksimigonte romanojn de May al infanoj, germanaj instruistoj simpligis vortan trezoron de May, precipe ili formetis ĉiujn gerundiojn.

Rilato de germanaj nazioj kaj komunistoj al May

Paradokse libroj de May plaĉis al Adolf Hitler. Sed aliaj rasistaj nazioj ilin ne ŝatis, ĉar indiano por ili estis nur “subhomo” (*Untermensch*). Kiam en Germanio nazioj uzurpis potencon, ili bruligis ne nur bibliojn kaj lernolibrojn de esperanto, sed ankaŭ librojn de May.

Por komunistoj May estis novriĉulo, burĝoaĉo. En socialisma Germana Demokratia Respubliko ekde la jaro 1958 oni librojn de May oficiale ne malpermesis, sed forprenis ilin el publikaj bibliotekoj kaj novajn librojn ne eldonis. (La sama situacio estis ankaŭ en socialisma Ĉeĥoslovakio.) Sed en la 80aj jaroj Erich Honecker rigardis filmon pri Winnetou kaj ĝi al li tiel multe plaĉis, ke oni librojn de May denove ekeldonis.

El bibliografio de Karl Friedrich May

Pandur und Grenadier (1883, Panduro kaj Grenadisto)
Der Sohn des Bärenjägers (1887, Filo de Ĉasanto de Ursoj)
Der Geist des Llano Estacado (1888, Fantomo de Llano Estacado)
Der Schut (1888, Ĵut)
Der schwarze Mustang (1889 – 1897, Nigra Mustango)
Der blaurote Methusalem (1888 – 1889, Blua-ruĝa Metuzalemo)
Die Sklavenkarawane (1889 – 1890, Karavano de Sklavoj)
Der Schatz im Silbersee (1890 – 1891, Trezoro ĉe Arĝenta Lago)
Das Vermächtnis des Inka (1891 – 1892, Testamento de Inkao)

Satan und Ischariot (1893 – 1896, Satano kaj Judaso)
Winnetou I – III (1893)
Der Ölprinz (1893 – 1894, Petrola Reĝido)
Im Reiche des silbernen Löwen (1897 – 1903, En Regno de Arĝenta Leono)
Abdahn Effendi (1908, Majstro Abdan)
Winnetou IV (1897-1908).

Filmoj laŭ romanoj de Karl May

Trezoro ĉe Arĝenta Lago (1962).

Kunlaboro: Germanio, Italio, Jugoslavio.

Reĝisoro: Harald Reinl.

Aktoroj: Lex Barker, Pierre Brice, Herbert Lom, Eddie Arent, Ralf Wolter, Karin Dor k. a.

Aliaj sukcesaj filmoj sekvis. Rolon de Nŝo-ĉi, fratino de Winnetou, ludis franca alktorino Marie Versini. En filmo pri Winnetou (II) ludis itala aktoro Terence Hill kun Karin Dor.

Filmistoj faris kelkajn erarojn, ekzemple ili montris belajn scenojn kun kanuoj, sed veraj apaĉoj la kanuojn neniam uzadis. Vestaĵoj de Winnetou, Nŝo-ŝi, Ribanna kaj aliaj filmaj apaĉoj apartenis al aliaj triboj, ĉar la vestaĵoj de veraj apaĉoj ne estis tiel koloraj. Ankaŭ vestaĵoj de blankuloj korespondas kun modo de Holywood, sed ne kun realaj vestaĵoj de eŭropaj elmigrintoj kaj la unuaj konkerantoj de Sovaĝa Okcidento de Usono. Mi observis, ke en tiuj filmoj ludis eĉ ne unu afrikano.

Se filmistoj bezonis krei rolon ekzemple por Uschi Glas, ili tute ŝanĝis scenarion kaj kreis hibridulinon Apanaĉi-n, kiun May ne sciis (la filmo *Winnetou und das Halbenblut Apanatschi*, Winnetou kaj Hibridulino Apanaĉi, 1966).

La filmoj sukcesis en Eŭropo, sed ne en Usono, ĉar usonanoj havis siajn proprajn priskribantojn de usona historio (Francis Bret Harte, Thomas Mayne Reid k. a.).

Konkurantaj socialismaj filmoj

Komunistoj en Germana Demokratia Respubliko (GDR) observis sukceson de filmoj laŭ romanoj de Karl May. Ili kreigis filmojn laŭ romanoj de aliaj aŭtoroj kaj kun aktoroj el socialismaj landoj.

Filoj de Granda Ursino (1966)

Aŭtorino de romano: Liselotte Welskopf-Heinrich.

Kunlaboro: GDR, Ĉeĥoslovakio.

Reĝisoro: Josef Mach.

Ĉefa rolo: Gojko Mitić.

Oro en Black Hills (1968)

Aŭtoro de romano: Gert Fritz Unger.

Kunlaboro: GDR, Sovetunio.

Reĝisoro: Konrad Petzold.

En ĉefaj roloj: Gojko Mitić, Barbara Brylska.

Signifo de Karl Friedrich May

Romanoj kaj rakontoj de May influis kelkaj generaciojn ne nur en Germanio. Sub lia influo ĉe ni evoluis trampa movado, kies verkistoj Bob Hurikán, Otakar Batlička k. a. verkis en stilo de May. Kvankam persona vivo de May ofte ne estis feliĉa, en liaj romanoj abundas sopiro pri libereco, justeco kaj paco.

Rekomendita literaturo

- FARIN, K. 1994: Karel May – první německá pop-hvězda. 1a eld., Prago, Arcadia, 153 paĝoj.
- FISCHER, O. A. 2025: Orĥideoj vivantaj kaj sur poŝtmarkoj (Asparagales, Orchidaceae). 1-a eld., Brno, MSD, 83 paĝoj.
- FLOS, F. 1920: Souborný Šibřaváček. Život a dílo samorostlého filosofa z lesů. 1a eld., Prago-Smíchov, Jan Kotík, 301 paĝoj.
- FLOS, F. 1924: Narostla nám křídla: povídka ze života. 1a eld., Prago, Ústřední nakladatelství a knihkupectví učitelstva československého, 113 paĝoj.
- FLOS, F. 1930: Šťěstí najdeš na ulici: povídka. 2a eld., Prago, Česká grafická unie, 129 paĝoj.
- FLOS, F. 1934: Ferda detektiv: hra o třech jednáních a proměně. 1a eld., Prago, Česká grafická unie, 69 paĝoj.
- FLOS, F. 1937: Plavčík Frantík. 2a eld., Prago, Novina, 127 paĝoj.
- FLOS, F. 1938: Babiččin Šmodrcha. Dětský románek. 2a eld., Prago, Ústřední nakladatelství a knihkupectví učitelstva československého, 144 paĝoj.
- FLOS, F. 1946: Statečný rod. 2a eld., Prago, Pamir, 126 paĝoj.
- FLOS, F. 1947: V bažinách argentinských. Dobrodružný román ze severní Argentiny. 1a eld., Prago, F. Kosek, 162 paĝoj.
- FLOS, F. 1968: Supové Atlasu. 3a eld., Hradec Králové, Kruh, 158 paĝoj.
- FLOS, F. 1970: Albatros: dobrodružný román z Moluk. 1a eld., Prago, Středočeské nakladatelství a knihkupectví, 160 paĝoj.
- FLOS, F. 1970: Strýcův odkaz. 1a eld., Prago, Albatros, 106 paĝoj.
- FLOS, F. 1971: Za pokladem. 1a eld., Prago, Albatros, 129 paĝoj.
- FLOS, F. 1973: Tajé afrických pralesů. 1a eld., Prago, Albatros, 164 paĝoj.
- FLOS, F. 1976: Na Modrém Nilu. 2a eld., Prago, Albatros, 62 paĝoj.
- FLOS, F. 1978: Vzducholodí do srdce Brazílie. 2a eld., Prago, Albatros, 63 paĝoj.
- FLOS, F. 1983: Z pralesů Konga. 2a eld., Prago, Albatros, 62 paĝoj.
- FLOS, F. 1995: Lovci orchidejí. 4a eld., Prago, Volvox Globator, 194 paĝoj.
- FLOS, F. 1996: Lovci orchidejí. La 2a volumo. V Pralesích Ekvádoru. 4a eld., Prago, Volvox Globator, 88 paĝoj.
- FLOS, F. 1996: Lovci orchidejí. La 3a volumo. Pod sluncem rovníkovým. 4a eld., Prago, Volvox Globator, 206 paĝoj.
- FLOS, F. 1998: Lovci kožešin: dobrodružný román ze života traperů a farmářů v Kanadě. 3a eld., Prago, Volvox Globator, 237 paĝoj.
- HEŘMAN, Z. 1962: Dobrodružné poznávání. Nad dílem Františka Flose. 1a eld., Prago, Státní nakladatelství dětské knihy, 146 paĝoj.
- JORDÁN, K. 2018: Dobrodružství jménem Orient: Karel May, Alois Musil, T. E. Lawrence – snílci, vědci, bojovníci. 1a eld., Brno, CPress, 239 paĝoj.
- MAY, K. 1991: Duch Llana Estacada. 1a eld., Prago, Český literární klub, 143 paĝoj.
- MAY, K. 1991: Poklad na Stříbrném jezeře. 1a eld., Vyškov, Hanácké nakladatelství, soukromá firma A-MOR Vyškov, 76 paĝoj.
- MAY, K. 1992: Já, náčelník Apačů. 1a eld., Prago, Olympia, 218 paĝoj.
- MAY, K. 1993: Odkaz posledního Inky. Dobrodružství v Jižní Americe. 1a eld., Prago, Toužimský & Moravec, 441 paĝoj.
- MAY, K. 1993: Žut. 2a eld., Prago, Olympia, 289 paĝoj.
- MAY, K. 2000: Baron Trenck. 1a eld., Brno, Návrat, 234 paĝoj.
- MAY, K. 2008: Červenomodrý Metuzalém: veselá studentská cesta do Číny. 1a eld., Prago, Václav Vávra, 246 paĝoj.
- MAY, K. 2011: Syn lovce medvědů: povídka z Dalekého západu. 1a eld., Prago, Albatros, 243 paĝoj.
- OLIVA, M. 2011: Zdeněk Burian – viděl světy dávno minulé... 1a eld., Brno, Moravské zemské muzeum, 34 paĝoj.
- ŠIKL, J. 1981: Legendy o Divokém západě. 1a eld., Prago, Práce, 224 paĝoj.

Personaĵoj

- Arent, Eddie, propranome Gebhardt Georg Arent (1925 – 2013)
- Barker, Lex, propranome Alexander Crichtlow Barker Jr. (1919 – 1973)
- Batlička, Otakar (1895 – 1942)
- Bob Hurikán, propranome Josef Peterka (1908 – 1965)

Brice, Pierre, propranome Pierre Louis Baron de Bris (1929 – 2015)
 Brylska, Barbara (*1941)
 Burian, Zdeněk (1905 – 1981)
 Cannary-Burke, Martha Jane, kromnomata Calamity Jane (1852 – 1903)
 Cody, William Frederick, kromnomata Buffalo Bill (1846 – 1917)
 Dor, Karin, propranome Käthe Rose Derr (1938 – 2017)
 Fehsenfeld, Friedrich Ernst (1853 – 1933)
 Fischer, Adalbert Johannes (1855 – 1907)
 Frič, Alberto Vojtěch (1882 – 1944)
 Fuchs, Oskar Max ((1873 – 1954)
 Glas, Uschi, propranome Glas, Helga Ursula (*1944)
 Hagenbeck, Carl Gottfried Wilhelm Heinrich (1844 – 1913)
 Harte, Francis Bret, propranome Francis Brett Hart (1836 – 1902)
 Henry, Benjamin Tyller (1821 – 1898)
 Hickock, James Butler, kromnomata Sovağa Bill (1837 – 1876)
 Hill, Terence, propranome Mario Girotti (*1939)
 Honecker, Erich (1912 – 1984)
 Kürschner, Joseph (1853 – 1902)
 Lebius, Rudolf (1868 – 1946)
 Lom, Herbert (1917 – 2012)
 Löwenherz-Hrubý el Jelení, Theodor Karel August (1826 – 1914)
 Mach, Josef (1909 – 1987)
 Mitić, Gojko, serbe Гoјko Mитић (*1940)
 Münchmeyer, Heinrich Gotthold (1836 – 1892)
 May, Klara Auguste Wilhemine, fraülinnome Beibler, vidvinnome Plöhn (1864 – 1944)
 Náprstek, Vojtěch, germane Adalbert Fingerhut (1826 – 1894)
 Petzold, Konrad (1930 – 1999)
 Pollmer, Emma Lina (1856 – 1917)
 Reid, Thomas Mayne (1818 – 1883)
 Reinl, Harald (1908 – 1986)
 Suttner, Bertha Sophie Felicitas von (1843 – 1914)
 Štorch, Eduard (1878 – 1956)
 Tatanka Jotanka, angle Sitting Bull (1831 – 1890)
 Troska, Jan, propranome Jan Matzal (1881 – 1961)
 Unger, Gert Fritz (1921 – 1944)
 Verne, Jules (1828 – 1905)
 Versini, Marie (1946 – 2021)
 Vilímek, Josef Richard (1835 – 1911)
 Vráz, Enrique Stanko (1860 – 1932)
 Welskopf-Heinrich, Liselotte (1901 – 1979)
 Winchester, Oliver Fisher (1810 – 1880)
 Wolter, Ralf (1926 – 2022)
 Zhoř, Antonín (1896 – 1965).

Adresoj

Kompanio de Karl May

Karl-May-Gessellschaft, prezidanto: Erwin Müller, Maximiliankorso 45, DE – 1000 Berlin, Germanio.

Klubo de Pierre Brice

Pierre-Brice-Club, prezidantino: Martina Schneider, Kniephofstrasse 5, DE – 1000 Berlin 41, Germanio.

Muzeoj

Karl-May-Strasse 4, DE – 9270 Hohenstein-Ernstthal.

Karl-May-Strasse 54, DE – 8122 Radebeul.

Heinstrasse 11, DE – 8600 Bamber.